

Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k85/k85.html>

Ne voĉdonu!



Osama 2, Obama 0

Deputitoj ne meritas pensiojn, kiujn vi neniam vidus.
Ili ne laboras por vi. Kial vi devus labori por ili?

*Redaktore**Ne voĉdoni ne plu estas nur simpla rajto,
sed ankaŭ morala devo*

Post nur kelkaj tagoj de la apero de nia magazino hispanoj estos kunvokataj de siaj partioj politikaj kaj registaro voĉdoni pri kiu fermita listo da kandidatoj plaĉos al ni, ke fari ĉion, kion ili faros per nia mono sen ia ajn respondeco antaŭ ni, krom tiu nebula puno post kvar jaroj..., kiu konsistas el voĉdoni alian partion, kiu faros same kiel la antaŭa solvi niajn problemojn.

Sed estas grava mensogo en tiu argumento...: la bato de civitanoj komunaj ne estas ne voĉdoni al kulpaj partio, sed voĉdoni al neniuj partio. Kiu partio ne kulpas pri fraŭdo politika kaj ekonomia en la nuna Hispanio? Ĉu ni deziras partiojn, kiuj tute seninteresiĝas pri la problemoj niaj, komunaj civitanoj? Oni diris al mi iam, ke ne voĉdoni estas ebligi, ke Franko denove venos regi nin, aŭ ke ne voĉdoni estas fari la deziron de kontraŭdemokratuloj, aŭ ke ne voĉdoni utilas al neniuj, ĉar eĉ se preskaŭ neniuj voĉdonas, la registaron formas la plej voĉdonita partio, ĉar iuj nepre voĉdonas, eĉ se nur anoj de konkurantaj partioj politikaj. La du unuaj argumentoj estas absurdaj, dum la tria estas praktika. Franko jam mortis. Ĉu li estis fiulo, ĉu ne, estas senutila debato, ĉar li ne eltombiĝos kaj li ne plu povas fari ion ajn ĉu bona ĉu malbona por ni.

La dua argumento, tamen, estas vere kontraŭdira kaj hipokrita. Kiu estas pli granda kontraŭanto de demokratio ol tiuj, kiuj *nun* malebligas demokration en His-

panio? Dum kvardek jaroj Fransisko Franko malebligis tion, kaj regis la landon nur per sia reĝimo, do ni povas diri, ke nur unu partio povis regi la landon. Sed nun, pro tiu fia argumento pri *utila voĉdono* preskaŭ ĉiu hispano voĉdonas ĉu por Partio Popola (laŭdire dekstro) ĉu Partio Socialisma Laborista Hispana (laŭdire maldekstro). Tio signifas, ke praktike ekzistas nur du partioj. Aldone, tiuj partioj faris, dum en povo, malmulte por la popolo, kiu pagas ilin. Ilia ĉefa koncerno estas pruvi, ke la alia partio, kiam estis en povo, faris ĉion eĉ pli malbone. PP ne nuligis la plej perversan leĝon de PSOE, kiam ĝi estis en povo, LOGSE, eĉ se tiu ĉi perfidas ĉiun dezireblan valoron en hispana edukado kaj, sekve, socio, kaj kreis la duan plej perversan leĝon en nia historio: La leĝo pri minorulo, kiu ebligas, ke krimulo tute ne respondecas antaŭ la socio kaj leĝo se li aŭ ŝi estas pli juna ol 18 jaraĝo.

Aliflanke, eble normala hispano ne memoras, ke kiam li aŭ ŝi voĉdonas por partio, li aŭ ŝi donacas al ĝi 0.54 eŭron, ĉar tiun kvanton ricevas sia politika partio. ***Dek milionoj da voĉdonoj estas 5 400 000 eŭroj.*** Ankaŭ, voĉdoni signifas, ke oni akceptas la rezulton de la balotado. Mi kontraŭas tion. ***Pro tio mi ne voĉdonas: Mi ne dungas sentaŭgulojn. Mi ne akceptas iliajn trompojn. Mi estas por libereco kaj kontraŭ diktatoreco.*** Ĉar partitokratio estas diktatoreco, ĉikaze de du partioj anstataŭ unu partio, kiam dum la regado de Fransisko Franko. Jen etikaj kialoj ne voĉdoni ĝis kiam estos demokratio en Hispanio. Jen rifuto al tria argumento, praktika.

Parolas la prezidanto



Estimataj
gehaleanoj!

Antaŭ kelkaj tagoj mi vidis la dokumentafilmon "inside job" (laboro de interno), kiu mirinde klarigas pri la krizo. Lernantoj ĉe mia klasĉambro laboros pri tiu dokumentafilmo, ĉar la parto-prenantoj parolas kaj diras malverojn pri la kaŭzo de la krizoj. Ni komprenas la rilaton inter vira penso kaj ekonomio. Finfine la aŭtoroj de la krizoj ne estas en la malliberejo. Tio estas kapitalismo.

En Hispanio oni havos baldaŭ balotadojn por urbodomo kaj komunuma aŭtonomio. Diras ĵurnaloj, ke socialista partio ĉifoje malvenkos la balotadon. Tio estas esperenda ĉar ili

ne scias kiel ataki krizojn.

Ili parolas pri solidareco sed ne kiel ataki krizon. Ili ne estas bonaj pri solvoj, sed la dekstra partio ankaŭ ne estas tiel.

La dekstra partio havas en siaj listoj personoj ne-honestaj. kiuj havas problemojn kun la justico. Sed ili venkos la venontan balotadon, mi timas.

Finfine mi devas diri al vi, ke nia revuo ankaŭ bezonas ŝanĝon. Kaj HALE ankaŭ bezonas ŝanĝon. Pro tio Mi ne plu volas esti Prezidanto. Oni malfermos baldaŭ procedon elekti novan prezidanton de HALE.

Johano Antono

La 2-an de mayo de 2011

Kaj Osāma finfine venkis Obaman!

Ŝajnas, ke ĉinokte usonaj soldatoj finfine trafis Osaman Bin Laden, perforte eniris sian domon, kaj mortigis lin. Oni jam scias multe da la intimaj detaloj de tiu evento, kaj ĉiuj singratulas kaj gratulas Obaman pro tio, ke la fia respondeculo de terorisma grupo Al Qaida estis mortigita.

Sed tio ne estas aprobinda. La maniero terorisma fari aferojn estas mortigi senkulpulojn kaprice. Sed ankaŭ serĉi apartan personon kaj mortigi lin pro tio, ke li aŭ ŝi estas grava. La terorisma maniero konsistas el mortigo de tiuj, kiuj ĝenas nian ideologion. Nia ideologio okcidenta defendas, ke ni ĉiuj rajtas esti feliĉaj kaj ĝui liberecon kondiĉe ke ni respektu leĝon. Leĝo estas tiu ilo, kiu garantias, ke ni ĉiuj havas tiun rajton dumvive. Se kelkaj inter ni perfortas la liberecon de aliaj, li aŭ ŝi nepre estu punata, sed por eviti, ke senkulpuloj pagu pro aferoj pri kiuj ili ne respondecas, ni ĉiuj havas la rajton havi justan procezon kun laŭleĝaj garantioj. Tiel estas en plejparto de okcidentaj landoj, kaj certe estas tiel en Usono, la plej maljuna demokratio el la mondo. Ne tio okazis pri Osama Bin Laden.



Se Osama Bin Laden estus arestita (same kiel Sadam Hussein estis) de tiuj soldatoj, kiuj anstataŭ mortigis lin, se lin oni translokigintus en usonan teritorion, se oni juĝintus lin kun la garantioj juraj, kiujn ĉiuj civitanoj el la mondo devus havi, certe oni povus pruvi, ke li meritas mortopunon. Certe oni ekzekutus lin, kaj finfine la okcidenta maniero fari aferojn ne estus perfortita. Kaj tiukaze oni povus diri, ke finfine Okcidento venkis AlQaida. Sed ŝajnas, ke ne tio okazis.

Mi vidis absurdan imagon hodiaŭ en televido: mi vidis prezidanton Obaman dirante, ke Bin Laden estis mortigata. Mi ne vidis ian ajn diferencon inter li aj Georgo Buŝ. Fakte, tiu parolo ne estis obama, sed buŝa: *ni iris por ili*, kaj *ni venkis*. Ni venkis la pafokonkurson. Bone.

Sed ni ne venkis la militon. Usono montris revolucian vojon al la mondo je la fino de la Dua Mondomilito, kiam unuafoje en la historio de la mondo, oni ne detruis la venkiton, sed oni helpis ĝin iĝi en modernan, civilizitan landon. Tio okazis pri Japanio, tio okazis pri Germanio, kiuj estas du el la ĉefaj landoj en la mondo hodiaŭ.

Sed nun ne temas pri landoj, sed pri religioj. Fanatikismojn oni ne povas batali perforte, ĉar perforto estas ilia



etoso, rimedo kaj kulturo, kaj ili ĉiam venkas iel tie: ili finfine estas ĉu venkintoj, ĉu martiroj. Kaj martiroj semas ekzemplon al multe da aliaj homoj, kiuj ankaŭ deziras iri en paradizon kun sia persona dio. Pro tio la milito ne plu estas armea, sed politika kaj filozofia. Oni devas klarigi ĉie kaj vaste pri la internaj kontraŭdiroj de la fido de tiu religio, islamo, kaj oni devas malebligi la ekeston de moskeojn, ĉar estas pruvite, ke tie oni enfajrigas junulojn en fidon militaman kontraŭ "nefiduloj", per milito kiun ili nomigas

"yihad", aŭ sankta milito. Kvazaŭ milito povus esti ia ajn ol fia aŭ sindefenda.

Sed, ciel ajn, demokratio devas respekti ĵurajn rajton al ĉiuj ajn, eĉ al Bin Laden. Ne estas demokratio sin gratuli pro tio, ke li estis murdita kiel rabia hundo. Pro tio mi povas konkludi, ke Osama venkis Obaman: terorisman procedon estis uzata kontraŭ li, pruvante, ke tia estas la maniero prava fari aferojn. Ke la Pilgrimaj Patroj eraris. Ke ne plu temas pri "ni la popolo", sed "ili la armeo". Kies ĉefestro nuna estas Barack Hussein Obama 2-a.

Se eĉ Osama Bin Laden rajtus havi justan juĝon, tio certigus, ke ni ĉiuj povas havi ĝin. Se oni akceptas, ke je kelkaj kazoj, tiun rajton oni povas depreni el persono, tio ebligas, ke ni povus iam esti malhavigita el tiu baza rajto, laŭ la konveno de la ŝtato aŭ la registaro. Kaj neo de bazaj rajtoj estas tio, kio Osama defendis: oni submetiĝu al deziro de Dio, kaj

ĉio okazas laŭ Siaj deziroj. Ĉu estas io pli ol hazardo, ke diferenco inter Obama kaj Osama estas ununura litero? Ĉu Demokratio estas nova dio? Ĉu ni submetiĝu al deziroj de Demokratio (kiuj ajn arogu al si ties esencon)? Aŭ ĉu demokratio daŭre estu *nur* neperfekta ilo sinregi fare de popolo?



Kurso pri Informadiko

GNU Image Manipulation Program: Programo linuksa pri manipulado de imagoj: jen la origino de tiu kurioza nomo. GNU fakte signifas *GNU is Not Unix*, aŭ GNU ne estas Unikso. Unikso estas malnova sed ankoraŭ uzata operaciumo en multaj grandaj komputiloj.

Mi ĉiam pensis, ke tiu difino pri GNU estas ŝerco, ĉar finfine neniuj komprenas tion, kio diable estas GNU, do ĝi devenis sinonimon por Linukso, kaj tial oni larĝe ne plu uzas ĝin por la operaciumo, krom kelkaj puristoj, kiuj havas nenion pli bonan fari.

Gimp estas jam ankaŭ nomo por programo, kiun oni prononcas *ĝimp*, kiu oni uzas modifi fotojn kaj ceterajn grafikaĵojn, same kiel Photoshop, sed kun grava diferenco inter ili du: **Gimp estas senpaga**, male al granda prezo de Photoshop.

Ĉiuj fotoj kaj bildoj uzataj en *Kajeroj el la Sudo* estas iel ŝanĝitaj per Gimp, plej ofte ŝanĝante la grandon, por ke oni povu komforte vidi tion, pri kio temas.

Se oni uzas Linukson, plej ofte ol ne oni ne bezonas instali ĝin, ĉar ĝi instaligas kun la operaciumo mem. Sed se tio ne estas tiel (ekzemple, la lasta versio de Ubuntu ne inkluzivas ĝin), oni tre facile povas instali ĝin per la instalilo, kiun la operaciumo inkluzivas, kiel programo **Synaptic**, aŭ alia simila, aŭ per la ordono **aptitude install gimp**.

GIMP

Sed se oni ankoraŭ uzas Vindozon, oni povas serĉi la programon ĉe <http://www.gimp.org> kaj instali ĝin el tiu loko.



Malferminte la programon, oni kons-tatas, ke estas ne unu, sed tri fenestroj: la plej maldekstra estas skatolo por la diversaj iloj de la programo, kaj jen la nomo ilskatolo; la dua, centra fenestro, estas la laborfenestro, kaj la tria fenestro estas por tavoloj, kanaloj kaj rutoj, sed ni diru simple tavolskatolo.

Ni nun uzos la bildon, kiu troviĝas ĉe http://www.gazetoteko.com/kajeroj/bildo_j/revolucia.png kaj post dekstroklako, ni konservas ĝin ĉe nia skribotablo elektronika. Poste ni lanĉas Gimp-on kaj malfermas tiun bildon. Nun ni uzu la unuan ilon, **kolorprenilon**, trovi la kolorojn de nia bildo: ni premu literon **o** kaj klaku sur loko molverda, ekzemple ene de **o** en vorto **revolucia**. Nun premante klavon **Ctrl** ni musklaku sur pli malklara parto, ekzemple la stelon. Ni jam ŝanĝis la du kolorojn de nia paletro. Venontfoje mi diros al vi kion fari per tio.

Sed mi devas averti vin, ke se vi rapidas pri kion vi povas fari per tiu ĉi programo, vi povas elŝuti informadon el informosistemo aŭ la loko el kie vi prenis la programon, en via propra lingvo. Se vi povas atendi, mi klarigos al vi en Esperanto iom post iom.

Lingvo de demokratio, ĉu?

Ian Fantom

Ni havas seriozajn aferojn por diskuti. Internacie, Esperantistoj diskutas pri la nuna stagnado de la Esperanto-movado. Ili parolas pri mistera kverelado en multaj landoj. Dume, la Esperanto-movado kolapsas dum la moŝtuloj lasas al ĝi kolapsi sub si.

En Britio la kverelado daŭris de post 1994, kiam Will Green ekŝiĝis kiel Honorofica Sekretario de Esperanto-Asocio de Britio. Nur en 2006 mi trovis leteron en kiu li klarigis la kaŭzojn de sia ekŝiĝo: obstaklado kaj financa kaŝado. Intertempe multaj entuziasmaj Esperantistoj provis bone kontribui al la poresperanta agado, sed unu post alia ili estis blokitaj. La Esperanta Parlamenta Grupo kolapsis pro simila kialo. Okazis misteraj kvereloj ĉe La Londona Esperanto-Klubo. Will Green ekŝiĝis kiel Honora Vizprezidanto, Peter Miles ĉesis veni post disputo kun John Wells. Mi mem petis ion diskuti kun John Wells fine de 2004 kaj mi ŝokiĝis pri la maniero en kiu li akre turnis sin al mi, daŭre ripetante, “Vi estas infaneca kaj kiel Lapenna”. Ĉu vere mia peto “Ĉu nun estas bona momento diskuti?” meritis tian traktadon?

En 2006 mi alprenis la redaktoradon de la kluba bulteno, kaj la reago de ordinaraĵaj membroj estis tre pozitiva. Mi ricevis ses spontanajn aplaŭdojn dum la jaro. Tamen ne ĉio estis kia ĝi ŝajnis.

Kiam mi ricevis la kontojn en la jarkunveno mi tuj rimarkis, ke la deklaro pri ĝusteco estis subskribita ne de kontkontrolisto, sed de la kasisto mem. Mi demandis pri tio, kaj la reagoj estis nehelpemaj. Se tio estis farita intence ĝi estas serioza afero. La impresio montrita estis, ke la kontoj estis kontrolitaj, kiam la subskribo estis tiu de la kasisto mem! La vortbatalo daŭris longe. Ili klarigis, ke unu kontkontrolisto malsanas, kaj ke la alia, Harry Barron, translokiĝis al Kimrio. Ili promesis ordigi la aferon por la posta jaro. Tamen en 2007 okazis ĝuste la sama afero denove. Neniu povas dubi, ke tiu falsado estis intenca. Iom poste mi demandis al la supozata kontkontrolisto, ĉu li ankoraŭ estas konkontrolisto de La Londona Klubo. Li miris. Li neniam estis kontkontrolisto, li neniam estis petita, li scias nenion pri kontado kaj li ne estus akceptinta. La kombino de eventoj lasas nenian dubon pri manipulado de la kontoj kaj misgvidado de la membroj.

Membroj estus same ŝokitaj kiel mi se ili komprenus pri la gamo de manipuloj kiuj okazas en la klubo, inter homoj kiujn ili traktas kiel amikojn jam dum multaj jaroj. Sed por mi la reguloj estas samaj kiuj ajn okupas la postenojn, kaj kelkfoje oni devas insisti ilin sekvi.

Membroj estus ankaŭ ŝokitaj se ili komprenus la manipuladon en la ĉijaraj elsendaĵoj de la klubo. En la

protokolo de la pasinta kunveno oni povus supozi, ke demando mia pri Harry Barron estas iel fripona. Ĝi ne estis. Kiam oni anoncis, ke Mikaelo Drogosz estas la nova kontrololisto, mi demandis, kio okazis al Harry Barron. La alineo registrita tute kontraŭas tion kion ili kredigis al la membroj en 2006 kaj 2007.

Estis ankaŭ aliaj manipuloj. Mi ne proponis Eksterordinaran Ĝeneralan Kunvenon; mi diris, ke tio necesas se la komitatanoj volas reelektiĝi. Anstataŭe ili anoncis daŭrigon de la Jarkunveno, ne menciante, ke ties celo estas elekti la komitaton. La komitatanoj ne estis dece elektitaj.

Eĉ pri la kvorumo estas misrepresentaĵo en la protokolo. Mi tutsimple demandis, kio estas la kvorumo, kaj sekvis longa parolado sen doni respondon. Mi devis insisti pri respondo, antaŭ ol ili anoncis, ke la komitato jam kalkulis, ke ĝi estas 7. Do kiam en la dua kunveno ili anoncis, ke ĝi estas 8, mi kompreneble demandis pri tio.

En tiu dua kunveno mi deziris scii kial John Wells prezidas anstataŭ la prezidanto, kiu sidis inter la ĉeestantaro. Ili voĉdonigis sen doni klarigon. Ili bone sciis ke estas serioza konflikto inter John Wells kaj mi, kaj do meti John Wells en tiun lokon bezonis klarigon.

En mia posta prelego pri la estonteco de la klubo, mi metis la ideon, ke la klubo ne akceptos ideojn pro tio ke ili estas bonaj

ideoj, sed nur se la moŝtuloj de la klubo pensos, ke estas en la propra intereso ilin akcepti. Mi detaligis kiel funkcias la memcenzurado en la brita gazetaro, inkluzive de la Esperanto-gazetoj. Priskribo kiun provizis George Orwell validas ankaŭ por la Esperanto-gazetoj en Britio, kiuj estas forte cenzuritaj. Mi detaligis unu ekzemplon de la propagando kiu okazas en Esperanto-Asocio de Britio.

Temis pri deklaro de la Prezidanto, profesoro John Wells [1], en kiu li donis du supozatajn ekzemplojn pri miaj “friponaj kaj eble misfamigaj asertoj” en iu komunikaĵo. Tiuj du ekzemploj estis absurde falsitaj. Iama jura konsilisto de EAB skribis al John Wells, ke tio estas parto de “feroca kaj misfamiga kampanjo kontraŭ Ian Fantom” [2]. La tekston de mia prelego mi poste rekonstruis sub titolo ‘Kial ni devas stagni?’, kaj tiun tekston mi provizos al legantoj laŭpete.

La misfamiga kampanjo ekis tuj post kiam mi liveris al John Wells, kiel prezidanto de EAB, finanĉan ĉarton, kiun mi kompilis dum miaj esploroj pri la kolapso de la membraro de la asocio. Ĝi estis en malneta formo, sed mi tuj liveris ĝin al li, dirante, ke iu ajn kiu trovas tian informon havas devon raporti ĝin al la Prezidanto. Ĝi montris, ke dum la tuta tempo en kiu la kasisto diris al la membroj, ke la asocio formangas sian kapitalon, la kapitalo fakte spektakle kreskadis. Ĉu aŭ ne oni devis vendi la domon estas alia demando, kiel ankaŭ kiel oni uzu la

kapitalon. Sed se tiu ĉarto estis proksimume ĝusta, la implico estas, ke la Estraro diris malveron al la membroj dum tiu periodo.

Tuj sekvis plua publika kverelo, kun minacoj se mi estos denove kandidato por la Estraro, aŭ se mi ne pardonpetos pro tio ke la kasisto ne ŝatis la tonon de demando farita duonjaron pli frue. La afero estis absurda. Mi mem ŝokiĝis pri la maniero en kiu John Wells kreis pluan uraganon da malamo en la asocio, ĉifoje direktita al mi. Sed mia rolo estis esplorado, kaj ĉion mi dokumentis, ĉar tio kion mi trovis estis tre grava: la enplektiĝo de John Wells almenaŭ en la maskado de tiu skandalo.

Mi travivis la Aferon Lapenna en Londono en 1973 kaj 1974, kaj tion mi iom studis tiutempe. Se John Wells kapablis fari tion al mi, li kapablis fari ankaŭ al Lapenna. Mi bezonis tridek jarojn por kompreni pli-malpli kio okazas. Se John Wells ne estas 'pordogardisto' [3] li certe kondutas tiel. Li laboris kun British Council kaj en sia retpaĝo klarigas ke li ne laboras por MI6.

Tiun ĉarton mi montris al multaj membroj kaj nemembroj de EAB dum la pasintaj jaroj. Neesperantistoj komprenis facile, sed preskaŭ neniu membro povis enkapigi ĝin, farante stultajn pretekstojn. La implico estas nepenseblaj. Tamen mi ĵus travivis kvin nekredeble malfacilajn jarojn en kiuj la vero estis daŭre subpremita per falsaj akuzoj, misfamigoj kaj mensogoj.

Fine mi sukcesis persvadi la redaktoron de EAB Update publikigi tiun finanĉarton [4]. Ankoraŭ la membroj estos en stato de percepta malakordo [5] dum la faktoj ne kongruas kun iliaj multjaraj perceptoj. Tamen iuj komprenos. Jam unu membro demandis: "Do kial ni vendis la domon?"

En unu jarkunveno la kasisto de EAB rekte akuzis min pri kalumnio, sen diri specife kio estas tiu kalumnio, eĉ kiam mi sukcesis demandi al ĉiuj en la ĉambro. Ne estis kalumnio miaflanke, sed rilatis al incidento en kiu mi montris al membroj de La Londona Esperanto-Klubo tiun finanĉarton. La kasisto de EAB mem ĉeestis la kunvenon kaj tute silentis. Sed la vere ŝoka afero estis, ke la Prezidanto de EAB, John Wells, rifuzis al mi la rajton respondi al tiu akuzo, sed mem ripetis ĝin. Mi ne kredas, ke John Wells laboras por lingvaj rajtoj aŭ ajnaj rajtoj, se li eĉ ne respektas la bazan homan rajton ke membro respondu al akuzo farita en la jarkunveno.

La Esperanto-movado en Britio estis transprenita de klico gvidata de klasafektuloj el privataj loĝlernejoj [6] kiuj gvidas la movadon en sakstraton. Membrara demandilo elsendita al membroj de la Londona Klubo ĉijare estis nur blufado por ŝajnigi, ke ili aŭskultas al membroj, kiam la malo estas la realo.

Dum 40 jaroj mi supozis John

Wells pozitive motivigita amiko. Ankaŭ Ivo Lapenna supozis lin amiko kaj pozitiva subtenanto. En 1995 John Wells anoncis, en sia lasta alparolo kiel Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, ke jes estis mensogoj en la Afero Lapenna. Li anoncis, ke li parolas en la nomo de UEA. Dek du jarojn pli poste mi eltrovis, ke la Estraro de UEA nenion sciis pri tio ĝis mi kaj dumil aliaj aŭdis liajn vortojn en tiu salonego. Ŝajnas, ke en tiu deklaro kuŝis la kulmina mensogo en la Afero Lapenna.

Ni ne solvos tiun ĉi problemon per unu frapo. La manipulado en la komunikiloj de Esperanto-Asocio de Britio kaj La Londona Esperanto-Klubo, kaj la manipulo de la demokratiaj procedoj estas troaj por ke ni povu fari per la normalaj manieroj. La unua paŝo estas certigi, ke homoj komprenas tiun eksterordinaran situacion, kaj ke ili estu en rekta kontaktado unu kun alia. Jam estis diskutoj en Britio pri 'io alia ol EAB', kaj internacie pri 'nova UEA'. Mi deziras diskuti kun Esperantistoj el ĉiuj landoj pri ĉiuj eblecoj.

Estas tre verŝajne, ke la reago al tiu ĉi artikolo estos plua flustrokampanjo por sugesti al homoj 'O, li estas malfacila persono', aŭ 'Ne aŭskultu al li', aŭ eĉ pli malbone, ekzemple, ke mi estas paranoja, kiel asertis John Wells kiam li unue vidis la ĉarton en decembro 2005. Sed daŭre dum mia esplorado mi trovis ke kiam ili akuzas aliajn pri misfaroj, ili ĝenerale akuzas pri aferoj pri kiuj ili mem kulpas. Homoj pensu por si mem.

Legantoj kiuj deziras esti en kontakto por priesplori la eblecojn savi la Esperanto-movadon bonvolu kontakti min rekte. Ni ne lasu al Esperanto morti.

Ian Fantom, 92 Enborne Road, Newbury, Britio, RG14 6AN, ian@fantom.org.uk

NOTOJ.-1. 'Statement by the President', EAB Update 41 (aprilo-junio, 2008), paĝo 3, (http://esperanto-gb.org/eab/eab_update/gxisdate41.pdf).

2. Retletero de Rik Dalton al John Wells, 2008-04-22, en 'EAB-eksiĝa korespondaĵo de Rik Dalton' (http://rik.poreo.org/rik_resignation/html), traduko ligita.

3. 'Pordogardisto', traduko de la angla 'gatekeeper': iu kiu filtris la komunikadon de organizaĵo.

4. 'Historia Kromnoto', Ian Fantom, EAB Update 53 (aprilo-junio 2011) paĝoj 12-13.

5. 'Percepta malakordo', mia traduko de la angla 'cognitive dissonance': malkomforto kiam prezentitaj faktoj ne kongruas kun la jam ekzistanta kredo.


6. 'Klasafektuloj el privataj loĝlernejoj', angle 'public school snobs': la britaj 'publikaj lernejoj' estas privataj loĝlernejoj; iuj el la plej ekskluzivaj edukas la infanojn esti aparte konkuremaj kaj superecaj al la mezaj klasoj, ofte afektante senarmiga ĉarmon.

LONDONA ESPERANTO-KLUBO - KASRAPORTO 2005

(1 jan - 31 dec)

SPEZKONTOJ			BILANCO		
(2004)	£	£	(2004)	£	£
RIMEDOJ			AKTIVO		
0.00 Novaj Dumvivaj	0.00		0.00 Kreditoroj	-10.00	
300.00 Kotizoj Dumvivaj	280.00		654.00 Debitoroj	10.00	
52.00 Kotizoj Anoj Foraj	42.00		5.99 Kontanto	81.39	
290.00 Kotizoj Anoj Ordinara	230.00		474.98 Giro Ordinara	2070.50	
40.00 Kotizoj Anoj Subtenantaj	80.00		68262.43 Giro Altinteresa	67158.93	
185.00 Donacoj	116.00		14610.69 Hipoteka Banko	14970.69	
2.18 Libro Budo	0.00		360.03 UEA	238.96	
8.00 Bufedo	0.00		353.46 Aliaj Havaĵoj	100.00	
1799.86 Rentumo	2256.50		84721.58 SUMO - HAVAĴOJ	84620.47	
574.91 Diversaj Enspezoj	0.00		ŜANĜO en HAVAĴOJ		
3251.95 SUMO - RIMEDOJ	3004.50		PASIVO		
KOSTOJ			65775.77 Ĝenerala Kapitalo	65916.11	
-11.73 Bulteno	-37.42		649.57 Dumviva Membreco	387.26	
-4479.00 Luo	-2008.00		320.02 Fonduso G A	320.02	
-299.59 Programo	-111.45		880.00 Fonduso JS	880.00	
-4.97 Administrado	-24.98		8740.01 Informado	8740.01	
0.00 Informado	-		8148.06 UK74-a	8266.47	
0.00 Aliaj Presaĵoj	0.00		97.55 Libro Budo	0.00	
-300.00 El fondusoj	-280.00		0.00 Eldonoj	0.00	
-820.13 Diversaj Elspezoj	-643.76		110.60 Propra Klubejo	110.60	
-5915.42 SUMO - KOSTOJ	-3105.61		84721.58 SUMO - KAPITALO	84620.47	
-2663.47 SALDO	-101.11				
Diversaj Elspezoj			KAPITALA KONTO		
Novjara Festo	-4.60		Havaĵoj 2005-01-01	65775.77	
Ludkartoj	-6.00		saldo	-101.11	
Poŝt-resendo	-66.05		De fondusoj	143.90	
Arbo Peter Miles	-20.00		Forigo de libroj el fonduso	97.55	
Kadro por "Diplomo"	-16.99		Havaĵoj 2005-12-31	65916.11	
Memorifesto Peter Miles	-253.04		DUMVIVA MEMBRECO		
UEA anonco 2005	-11.23		Saldo 2005-01-01	649.57	
Kurz-justigoj UEA	-6.39		Proporcio de rentumo	17.69	
Perdita ĉeko	-6.00		Novaj DV anoj	0.00	
Deskribo	-253.46		28 anoj x £10	-280.00	
sumo	-643.76		Saldo 2005-12-31	387.26	
Debitoroj			FONDUSO GEORGE ATKINSON		
Antaŭpago kotizo	10.00		Saldo 2005-01-01	320.02	
sumo	10.00		Por gastigado	0.00	
Kreditoroj			Saldo 2005-12-31	320.02	
Postpago kotizo	-10.00		FONDUSO JOHANO SPENCER		
Sumo	-10.00		Saldo 2005-01-01	880.00	
Diversaj Enspezoj			Pago	0.00	
neniaj			Saldo 2005-12-31	880.00	
sumo	0.00		INFORMADO		
Aliaj Havaĵoj			Saldo 2005-01-01	8740.01	
Libroj?	10.00		Pagoj 2005	0.00	
Ne scias	90.00		De UK74	0.00	
sumo	100.00		Saldo 2005-12-31	8740.01	
			UK74 (1989)		
			Saldo 2005-01-01	8148.06	
			Proporcio de rentumo	221.86	
			Por eksterlandaj prelegantoj	-103.45	
			Por informado	0.00	
			Saldo 2005-12-31	8266.47	
			ELDONOJ		
			Saldo 2005-01-01	0.00	
			Pago	0.00	
			Saldo 2005-12-31	0.00	
			PROpra KLUBEJO		
			Saldo 2005-01-01, 2005-12-31	110.60	
			FONDUSOJ SUME		
			Saldo 2005-01-01	18848.26	
			Ŝanĝo	-143.90	
			Saldo 2005-12-31	18704.36	

Krom rilate la valoro de la libroj kaj ekipaĵoj, laŭ mia opinio ĉi tiuj kontoj reflektas la finanĉan stato de la klubo dum 2005


Arturo Prent 30 Marto 2006

Mistera obeulino 2

La tutan semajnon ŝi pensis pri li kaj lia forta volo. Ŝi estis vidinta, ke li estis sekse eskcitita, sed tamen li ne prenis ŝin. Aferojn oni faru nur tiel, kiel li decidos. Ŝi ne povis ne agnoski, ke ŝi humiligis lin kiam ŝi mastris, sed li per ĝentilaj vortoj kaj dolĉaj manieroj submetigis ŝin multe pli efike...

Kiam ili denove renkontis, la aferon kiu estos mastro, kiu estos sklavo, ili ankoraŭ ne estis decidintaj; sed ŝia preferon ŝi montris evidente: ŝi vestumis sian ĵus aĉetitan ruĝan mantelon, kiu kovris ŝian ruĝan bluson kaj ruĝan minijupon, kiuj siavice kovris ŝian ruĝan mamzonon, ruĝan stringon, kaj ruĝajn ŝtrumpojn, kiuj ankaŭ kovris ruĝajn altajn ŝuojn. Ĉifoje ŝi mendis kaj pagis la hotelon, sed ili ne rendevuis en la ĉambro, sed en la kafejo de la hotelo.

—Saluton, Ana Maria—, diris li kun granda rideto sur sia vizaĝo. —Ĉu vi bone fartas?

—Saluton, Domingo—, ŝi diris. —Dankon, bone. Kaj vi?

—Mi ne povas plendi—, diris li, —ĉefe nun, kiam mi vidas vin.

Ŝi ruĝiĝis, kvazaŭ ŝi estus dekkvinjaraĝa, kio ŝokis ŝin mem. Sed tio nur evidentigis al li, ke ruĝa estas la plej konvena koloro por ŝi.

—Nu, Ana, diru al mi: ĉu vi pensis pri nia afero? Lastan fojon ni ne decidis kiu estos mastro, kiu sklavo...

Ŝi rigardadis planken, kaj diris tre mallaŭte:

—Ĉu ne evidentiĝas?

—Nu, vi estis tre bona mastrino. Estis komuniko inter ni du.

—Ĉu vi ne preferas esti mastro, Domingo?—, preskaŭ plendis ŝi.

—Esti via mastro estis bonega, Ana Maria. Sed mi devas scii, ĉu vi deziras esti sklavino vere, ĉu ne.

—Ĉu miaj vestaĵoj ne evidentigas?

—Nu, estas bela komplimento al mi, dankon.

Subite ŝi surgenuis antaŭ li kaj diris:

—Mastro, mi petas, prenu ĉi tiun sklavinon por ĉio, kion vi volos.

Li rapide ĉirkaŭokulumis, kaj rapide prenis ŝiajn manojn kaj puŝis ŝin denove en ŝian seĝon.

—Vidu, Ana, ke estas aliaj homoj ĉi tie. Mi proponas, ke ni finos niajn kafojn kaj poste ni iru en la ĉambron paroli pri ĉio tio. Ĉu vi konsentas?

Ŝi lasis sin porti sur sian seĝon, kaj ridetis. Post unu minuto da silento, ŝi prenis sian kafon, kaj ridetis al li, dum ŝi trinkis:

—Bone, Domingo. Nun vi jam konas mian deziron. Kiu estas via? Ĉu vi preferas, ke mi estu via mastrino?

—Fakte, Ana Maria, al mi plaĉas ankaŭ via elekto. Sed ni devas paroli pri la afero.

—Ĉu estas io dirinda pri la afero?

Unu mastras, la alia obeas. Kion pli?

—Nu, ĉu estas limoj, ĉu ne.

—Estos ĉio, kion mastro decidas. Sklavo akceptas, aŭ serĉas alian mastron.

Li rigardadis ŝin longe, kaj post du minutoj, li finfine parolis:

—Jes, Ana Maria, ni provu: mi akceptas esti via mastro, kondiĉe, ke vi akceptu kelkajn kondiĉojn.

—Mi aŭskultas.

—Unue, estos paŝvorto inter ni. se vi diras paŝvorton, kio ajn ni faras, haltiĝas tuj. Se vi ne povas diri la paŝvorton, estos afero, kiun vi povos fari por indiki ke vi dirus la paŝvorton, se vi povus paroli.

—Mi konsentas. Ĉu estas pli kondiĉoj?

—Mi bezonas scii kion vi ne ŝatas.

—Mi neniam estis sklavino. Mi ne vere scias. Ĉu ni ne povas provi kaj decidi poste?

—Nu, kompreneble. Dua kondiĉo estas, ke vi devas ĉiam paroli al mi plej respektame, sed tamen fojfoje ni rendezuos ci-al-cie, tio estas, kiel du amikoj, kiuj povas paroli tute libere. Nu vi parolu, Ana Maria. Ĉu vi havas kondiĉojn?

—Ne.

—Nun mi iras al ĉambro. Vi venu baldaŭ.

Li iris paroli kun hotelisto, al kiu li demandis kelkajn aferojn por viziti la venontan tagon en la urbo. Dume, ŝi pagis la kafojn, kaj iris en la ĉambron.

Li venis kiam ŝi ĵus fermas la pordon. Vidante lin, ŝi denove malfermis ĝin.

—Saluton, mastro!

Li ridetis al ŝi, kaj karesis mallonge ŝian hararon enirante la ĉambron.

—Enŝaltu la televidilon, kara.

Ŝi tion faris, kaj tuj poste li signalis per sia mano al planko apud li. Ŝi obeeme sidis sur la planko apud li. Li karesis ŝian hararon, kaj diris, ke plaĉas multe al li ĝi. Li demandis ĉu ĝi estas nature ruĝa, ĉu ŝi pentras ĝin. Sed vera ruĝhararolino ŝi estas.

Ili pasigis la tutan semajnfino en la ĉambro. Televideo estis ekskuzo por la ago simple esti kune. Estis multe da tenereco en la maniero per kiu li tuŝis ŝin, en la maniero per kiu ŝi alkroĉis al li la tutan tempon. Finfine li prenis ŝian kapon per siaj du manoj, kaj lasis longan kaj profundan kison en ŝian buŝon. Li esploris ŝian korpon per siaj manoj, kaj uzis ŝin la du tagojn. Li ne uzis ludilojn tiufoje, nur manoj kaj buŝo. Sed ŝi suferis ŝokon kvazaŭ elektran, ĉar ŝi kontrolis nenion pri tio, kio okazas. Ŝi sentis sin tute lia. Ŝi ne sciis kiom longe la afero daŭrigos, sed ŝi pretis profiti la aferon ĉiom longe, kiom ĝi daŭru.

Je la fino de la semajnfino, lunde frumatene, li forlasis la hotelĉambron, dum ŝi ankoraŭ dormis.

Ĉu daŭrigota?

Jack Crane

La faraono *Ĉapitro 31^a*


Hiram plenumis la promeson. Ĉiutage en la princa palacon en Pi-Bast venis amasoj da sklavoj kaj longaj vicoj da azenoj, portantaj tritikon, hordeon, sekigitan vianon, teksaĵojn kaj vinon. Oron kaj multekostajn ŝtonojn alportis feniciaj komercistoj sub kontrolo de la oficistoj de Hiram.

Tiamaniere en la daŭro de la daŭro de kvin tagoj la princo ricevis la promesitajn cent talentojn. Hiram postulis malgrandan procenton: unu talenton po kvar jare kaj ne postulis garantion, sufiĉis al li princa kvitanco, konfirmita de la tribunalo.

La bezonoj de l' kortego estis malavare provizitaj. Tri amatinoj de l' princo ricevis novajn vestojn, multe da parfumoj kaj po kelke da sklavinoj de diversaj koloroj. La servistoj havis multon da manĝaĵo kaj vino, la reĝaj laboristoj ricevis la salajron, la soldatoj — aldonajn porciojn.

La kortego estis ravita, tiom pli, ke

Tutmozis kaj aliaj nobelaj junuloj, laŭ ordono de Hiram, ricevis sufiĉe grandajn pruntojn, kaj la nomarĥo de l' provinco Habu kaj liaj oficistoj ricevis multekostajn donacojn.



Festeno sekvis festenon, amuzaĵo amuzaĵon, malgraŭ la senhalte kreskanta varmego. La vic-reĝo, vidante la ĝeneralan ĝojon, mem estis kontenta. Ĉagrenis lin nur unu cirkonstanco: la konduto de Mefres kaj de aliaj pastroj. La princo pensis, ke ĉi tiuj altranguloj riproĉos lin, ke li prenis tiel grandan pronton de Hiram, malgraŭ la admonoj ricevita en la templo. Dume la sanktaj pastroj silentis kaj eĉ ne montris sin ĉe ia kortego.

—Kion tio signifas—, diris li foje al Tutmozis, —ke la pastroj ne riproĉas nin? Tian lukson, kiel nun, ni neniam permesis al ni. La muziko sonas de la mateno ĝis la nokto, kaj ni trinkas de la leviĝo de l' suno kaj ekdormas kun virinoj en la brakoj aŭ kun kruĉo sub la kapo...

—Kial ili devus fari al ni riproĉojn? —, respondis Tutmozis indigninte.

—Ĉu ni ne vivas en la urbo de Astarte, por kiu la plej agrabla kulto estas la plezuro, la plej dezirinda ofero — la amo? Cetero, la pastroj komprenas, ke post tiel longaj fastoj kaj preĝoj vi bezonas ripozon.

—Ĉu ili diris ion al vi?—, demandis kun maltrankvilo la princo.

—Pli ol unu fojon. Hieraŭ, ekzemple, la sankta Mefres diris al mi ridante, ke tiel junan viron, kiel vi, pli allogas la plezuroj, ol la diservo aŭ la klopodoj de la regado.

Ramzes ekmeditis: Do la pastroj opinias lin senkonsidera malgraŭ tio, ke dank' al Sara li hodiaŭ, morgaŭ fariĝos patro? Sed tiom pli bone, ili havos surprizon, kiam li ekparolos al ili per sia propra lingvo.

Verdire, la princo mem iom riproĉis sin: de la tago, kiam li forlasis la templon de Hator, li eĉ unu tagon ne okupiĝis per la aferoj de la nomeso Habu. La pastroj povas supozi, ke li estas tute kontenta de la klarigoj de Pentuer, aŭ ke la ŝtataj aferoj jam tedis lin.

—Tiom pli bone!—, murmuretis li.
—Tiom pli bone!

En lia juna animo, sub influo de la konstantaj intrigoj aŭ suspektoj pri intrigoj, komencis naskiĝi instinkto de la hipokriteco. Ramzes sentis, ke la pastroj tute ne suspektas, pri kio li parolis kun Hiram kaj kiajn planojn li ŝpinis en sia kapo. Por tiuj ĉi blindigitaj homoj sufiĉis, ke li amuziĝas, kaj ili konkludis, ke la regado restos en iliaj manoj.

—La dioj tiel malklarigis ilian prudenton—, diris al si Ramzes, —ke ili eĉ ne demandas: kial Hiram donis al mi tiel grandan prunton? Eble la ruza Feniciano sukcesis dormigi iliajn suspektemajn korojn? Tiom pli bone! Tiom pli bone!

Estis por li stranga plezuro, kiam li pensis, ke la pastroj estis trompitaj pri lia konto. Li decidis ankaŭ en la estonta tempo lasi ilin en la eraro, li do amuziĝis kiel freneza.

Efektive la pastroj, precipe Mefres kaj Mentezufis, estis trompitaj pri Ramzes kaj Hiram. La ruza Feniciano ŝajnis antaŭ ili homon tre fieran pro la rilatoj kun la kronprinco, kaj la vicreĝo kun ne malpli granda sukceso ludis la rolon de diboĉanta junulo.

Mefres eĉ pensis, ke la princo serioze pensas forpeli Fenicianojn el Egipto, kaj dume li kaj liaj korteganoj faras ŝuldojn, kiujn ili neniam pagos.

En tiu tempo en la templo de

Astarte, en ĝiaj multenombraj ĝardenoj kaj kortoj svarmis amaso da piuloj. Ĉiutage, se ne ĉiuhore, el la mezo de Azio, malgraŭ la terura varmego, venis al la granda diino iu pilgrimaro.

Tio estis strangaj pilgrimoj. Lacaj, kovritaj de polvo, ili iris kun muziko, dancante kaj kantante iafoje tre malĉastajn kantojn. La tagoj pasadis por ili en senhontaj diboĉoj por la honoro de la diino Astarte. Ĉiun tian anaron oni povis ne sole ekvidi, sed eĉ senti de malproksime: ĉar ili portis grandegajn bukedojn de freŝaj floroj en la manoj kaj en sakoj katojn, mortintajn dum la tuta jaro.

La katojn la piuloj donis al la paraŝitoj por balzamado aŭ pajloŝtopado, kaj poste ili reportis ilin hejmen, kiel respektatajn sanktajn restaĵojn.

En la komenco de la monato Misori (majo, junio) la princo sciigis al Hiram, ke en la vespero de la sama tago li povas veni en la fenician templon de Astoret. Kiam post la subiro de l' suno fariĝis mallume en la stratoj, la vic-reĝo alliginte mallongan glavon al la flanko, surmetis mantelon kun kapuĉo kaj ne rimarkita de iu servisto elglitis por iri en la domon de Hiram.

La maljuna riĉulo atendis lin.

—Do—, diris li kun rideto, —via ekscelenco ne timas eniri en fenician templon, kie sur la altaro sidas la krueleco, servata de la ruzo?

—Timi?—, demandis Ramzes, rigardante lin preskaŭ kun malestimo.

—Astoret ne estas Baal, nek mi infano, kiun oni povas ĵeti en la brulantan ventron de via dio.

—Kaj ĉu vi, princo, kredas tion? Ramzes levis la ŝultrojn.

—Respektinda kaj konfidinda atesanto—, respondis li, —rakontis al mi pri viaj oferoj el infanoj. Foje ventego rompis al vi dekelkon da ŝipoj. Tuj la tiraj pastroj anoncis diservon, al kiu iris granda popolamaso.

La princo parolis kun videbla indigno.

—Antaŭ la templo de Baal, sur altaĵo, sidis grandega bronza statuo kun bova kapo. Ĝia ventro estis hejtita ĝis ruĝe. Tiam, laŭ ordono de viaj pastroj, la malsaĝaj feniciaj patrinoj komencis meti plej belajn infanojn ĉe la piedoj de la kruela dio.

—Nur knabojn—, intermetis Hiram.

—Jes, nur knabojn—, ripetis la princo. —La pastroj superverŝis ĉiun infanon per parfumoj, kaj tiam la statuo kaptis ilin per siaj bronzaĵoj, malfermis la buŝegon kaj englutis la infanon, malespere krintan. Ĉiufoje el la buŝo de l' dio eliĝis flamoj.

Hiram mallaŭte ridis.

—Kaj via ekscelenco kredas tion?

—Tion rakontis al mi homo, mi

ripetas, kiu neniam mensogas.

—Li diris, kion li efektive vidis—, respondis Hiram. —Sed ĉu ne mirigis lin, ke neniŭ patrino, kies infanojn oni bruligis, ploris?

—Vere li miris pro la indiferenteco de l' virinoj, ĉiam pretaj verŝi larmojn eĉ super mortinta kokino. Tio pruvas grandan kruelecon de via popolo.

La maljuna Feniciano balancis la kapon.

—Kiam tio okazis?—, demandis li.

—Antaŭ kelke da jaroj.

—Bone—, malrapide parolis Hiram, —se via ekscelenco volos iam viziti Tiron, mi havos la honoron montri al vi tian solenon.

—Mi ne deziras ĝin vidi!

—Poste ni iros en alian korton de l' templo, kie vi vidos tre belan lernejon, kaj en ĝi — sanajn kaj gajajn la samajn knabojn, kiujn oni bruligis antaŭ kelke da jaroj.

—Kiel?—, ekkriis Ramzes, —ili do ne pereis?

—Ili vivas kaj kreskas por fariĝi bravaj maristoj. Kiam via ekscelenco fariĝos sankteco (vi vivu eterne!) eble pli ol unu el ili direktos viajn ŝipojn.

—Vi do trompas vian popolon?, —ridis la princo.

—Ni trompas neniun—, respondis serioze la Feniciano. —Ĉiu trompas sin mem, se li ne petas klarigojn pri la soleno, kiun li ne komprenas.

—Mi volus scii...—, diris Ramzes.

—Efektive—, daŭrigis Hiram, —ekzistas ĉe ni moro, ke la malriĉaj patrinoj, por certigi feliĉan sorton al siaj filoj, oferas ilin al la ŝtato. La infanoj estas kaptataj de la statuo de Baal, en kiu estas

brulanta forno. Ĉi tiu ceremonio ne signifas, ke la infanoj vere estas bruligataj, sed ke ili fariĝis propraĵo de la templo kaj pereis por la patrinoj, kvazaŭ falinte en fajron.

En la realeco ili ne iras en fornon, sed al nutristinoj kaj vartistinoj, kiuj edukas ilin dum kelke da jaroj. Kiam ili pligrandiĝas, prenas ilin kaj instruas la pastra lernejo de Baal. La plej kapablaj fariĝas pastroj aŭ oficistoj; la malpli inteligentaj -- maristoj kaj ofte akiras grandajn riĉaĵojn.

Nun vi, princo, ne miros plu, ke niaj patrinoj ne ploras siajn infanojn. Mi diros pli: nun vi komprenos, kial en niaj leĝoj ne ekzistas punoj por la gepatroj, kiuj mortigas siajn idojn, kiel en Egipto.

—Ĉie oni trovas krimulojn—, intermetis la vic-reĝo.

—Sed ĉe ni ne ekzistas idomortigantoj—, daŭrigis Hiram. —Ĉar ĉe ni pri la infanoj, kiujn ne povas nutri iliaj patrinoj, zorgas la ŝtato kaj la temploj.

La princo ekmeditis.. Subite li ĉirkaŭprenis Hiramon kaj ekkriis kortuŝita:

—Vi estas multe pli bonaj ol tiuj, kiuj rakontas pri vi tiel terurajn historiojn. Mi tre ĝojas pro tio.

—Ankaŭ en ni estas ne malmulte da malbono—, respondis Hiram, —sed ni ĉiuj estos viaj fidelaj servistoj, sinjoro, kiam vi alvokos nin.

—Vere?—, demandis la princo, penetre rigardante liajn okulojn. La maljunulo metis la manon sur la

koron.

—Mi ĵuras al vi, egipta kronprinco kaj estonta faraono, ke se iam vi komencos batalon kontraŭ niaj komunaj malamikoj, la tuta Fenicio, kvazaŭ unu viro, alkuros por helpi vin.

Kaj jen ĉi tion prenu, kiel memo-
raĵon de nia hodiaŭa interparolado.

Li eltiris el sub la vesto oran medalon, kovritan de misteraj signoj kaj, murmurante preĝojn, pendigis ĝin sur la kolo de Ramzes.

—Kun tiu ĉi amuleto—, diris Hiram, —vi povas trakuri la tutan mondon... Kaj kie ajn vi renkontos Fenicianon, li servos al vi per sia konsilo, oro, eĉ glavo... Kaj nun ni iru.

Pasis jam kelke da horoj post la subiro de l' suno, sed la nokto estis luma, ĉar leviĝis la luno. La terura taga varmego cedis al la malvarmeto; en la pura aero ne estis plu la griza polvo, kiu tage venenis la spiradon kaj pikis la okulojn. Sur la blua ĉielo tie ĉi kaj tie brilis la steloj, kies lumo disfluis en la radioj de la luno.

En la stratoj ĉesis la movado, sed la tegmentoj de ĉiuj domoj estis plenaj de amuziĝantaj homoj. Ŝajnis, ke Pi-Bast estas unu salono plenigita per muziko, kanto, rido kaj sonoj de pokaloj.

La princo kaj Feniciano iris rapide, ekster la urbon, elektante malpli

lumigitajn stratojn. Malgraŭ tio, la homoj festenantaj sur la terasoj, iafoje rimarkis ilin kaj invitis aŭ ŝutis florojn sur iliajn kapojn.

—Noktaj vaguloj!—, oni kriis de la tegmentoj. —Se vi ne estas ŝtelistoj, kiujn la nokto allogas al ĉaso, venu al ni. Ni havas bonan vinon kaj gajajn virinojn.

La du vojaĝantoj ne respondis la afablajn invitojn, rapidante al la celo. Fine ili eniris en parton de l' urbo, kie estis malpli da domoj kaj pli da ĝardenoj, kies arboj dank' al la malseka blovo de l' maro kreskis pli altaj kaj branĉoriĉaj, ol en la sudaj provincoj de Egipto.

—Jam ne malproksime—, diris Hiram.

La princo levis la okulojn kaj super la densa verdaĵo de l' arboj ekvidis kvadratan turon de blua koloro, kaj sur ĝi -- blankan, malpli grandan. Tio estis la templo de Astarte. Baldaŭ ili eniris en la mezon de l' ĝardeno, de kie oni povis ĉirkaŭpreni per la rigardo la tutan konstruaĵon.

Ĝi konsistis el kelke da etaĝoj. La unuan formis kvadrata teraso 400 paŝojn longa, kiu kuŝis sur muro kelke da metroj alta, nigre kolorigita. Ĉe la orienta flanko estis perono, al kiu kondukis du larĝaj ŝtuparoj. Ĉe la aliaj flankoj staris turetoj, dek ĉe ĉiu; inter ĉiuj du turetoj estis kvin fenestroj.

Proksimume en la mezo de la teraso leviĝis konstruaĵo ankaŭ kvadrata, kies flankoj estis ducent paŝojn longaj. Ĝi havis nur unu ŝtuparon, turojn ĉe la anguloj kaj estis de purpura koloro.

Sur la plata tegmento de ĉi tiu konstruaĵo staris denove kvadrata teraso, kelke da metroj alta, de ora koloro, kaj sur ĝi, unu sur la alia, du turoj: blua kaj blanka.

La tuto havis tian aspekton, kvazaŭ iu metis sur la tero grandan nigran ĵetkubon, sur ĝi, malpli grandan purpuran, sur ĝi oran, pli alte bluan kaj plej alte arĝentan. Al ĉiu el ĉi tiuj etaĝoj kondukis ŝtuparoj, aŭ flankaj duoblaj, aŭ frontaj simplaj, ĉiam ĉe la orienta flanko.

Apud la ŝtuparoj kaj pordoj staris alterne grandaj egiptaj sfinksoj, aŭ asiriaj flugilaj bovoj kun homaj kapoj.

La vic-reĝo kun plezuro rigardis la konstruaĵon, kiu en la lumo de la luno, sur la fono de la folioriĉaj kreskaĵoj havis ĉarman aspekton. Ĝi estis konstruita en la stilo ĥaldeaj kaj tute diferencis de la egiptaj temploj, unue per la sistemo de l' etaĝoj, due per la vertikalaj muroj. Ĉe Egiptanoj ĉiu grava konstruaĵo havis deklivajn murojn, kvazaŭ kuniĝantajn supren.

La ĝardeno ne estis malplena. En

diversaj punktoj oni vidis malgrandajn domojn kaj palacojn, brilis lumoj, sonis kantoj kaj muziko. Inter la arboj, de tempo al tempo glitis ombro de ama paro.

Subite proksimiĝis al ili maljuna pastro; li interparolis kelke da vortoj kun Hiram kaj profunde sin klininte antaŭ la princo, diris:

—Bonvolu, sinjoro, sekvi min.

—Kaj la dioj gardu vian ekscelencon—, aldonis Hiram forlasante ilin.

Ramzes iris post la pastro. Iom flanke de la templo, en la plej granda densaĵo staris ŝtona benko, kaj cent paŝojn de ĝi malgranda palaco, apud kiu sonis kantoj.

—Tie oni preĝas?—, demandis la princo.

—Ne!—, respondis la pastro, ne kaŝante sian abomenon. —Tie kolektiĝas la adorantoj de Kama, nia pastrino, kiu gardas la fajron antaŭ la altaro de Astoret.

—Kiun ŝi akceptos hodiaŭ?

—Neniun, neniam!—, respondis la gvidanto kun indigno. —Se pastrino de la fajro rompus la ĵurpromeson de l' ĉasteco, ŝi devus morti.

—Kruela leĝo!—, diris la princo.

—Bonvolu, sinjoro, atendi sur ĉi tiu benko—, diris malvarme la fenicia pastro. —Kaj kiam vi ekaŭdos tri batojn en la bronzajn ladojn, suriru la terason kaj de tie la purpuran konstruaĵon.

—Sola?

—Jes.

La princo sidiĝis sur la benkon, en la ombro de olivarbo, kaj aŭskultis la virinajn ridojn, sonantajn en la palaco.

"Kama?", pensis li. "Bela nomo! Ŝi devas esti juna, eble bela, kaj tiuj ĉi malsaĝaj Fenicianoj minacas ŝin per la morto, se... Ĉu tiel ili volas certigi al si almenaŭ dekelkon da virgulinoj en la tuta lando?"

Li ridis, sed li estis malĝoja. Oni ne scias kial li kompatis ĉi tiun nekonatan virinon, por kiu la amo estis la pordo en la tombon.

—Mi imagas Tutmozison, se oni nomus lin pastrino de Astoret! Kompatinda, li devus morti, antaŭ kiam unu lampo forbrulus antaŭ la diino.

En la sama momento antaŭ la palaco eksonis fluto kaj ludis melankolian melodion, kiun akompanis voĉoj de kantantaj virinoj.

—Ahaa! Ahaa!—, kantis la virinoj, kvazaŭ lulante infanon. Eksilentis la fluto, ĉesis kanti la virinoj, kaj eksonis bela vira voĉo greke:

—Kiam sur la balkono ekbrilas via vesto paliĝas la steloj kaj eksilentas la najtingaloj, kaj en mia koro naskiĝas tia silento, kiel sur la tero, kiam salutas ĝin la blanka aŭroro.

—Ahaa! Ahaa!—, kantetis la virinoj, la fluto ree ludis unu strofon.

—Kaj kiam dronante en via preĝo, vi iras al la templo, la violoj ĉirkaŭas vin per bonodora nubo, la papilioj flirtas apud via buŝo, la palmoj klinas siajn kapojn antaŭ via beleco.

—Ahaa! Ahaa! Ahaa! Ahaa!

—Kiam mi ne vidas vin, mi rigardas la ĉielon por rememori la dolĉan trankvilon de via vizaĝo. Vana peno! La ĉielo ne havas vian serenon, kaj ĝia varmego estas frosto kompare kun la flamoj, kiuj cindrigis mian koron.

—Ahaa! Ahaa!

—Foje mi haltis inter la rozoj, kiujn la brilo de viaj rigardoj vestas per skarlato, blanko kaj oro. Ĉiu ilia folio rememorigis al mi unu horon, ĉiu floro unu monaton, pasigitan ĉe viaj piedoj, kaj la gutoj de la roso — ili estas miaj larmoj, per kiuj sin nutras la terura vento de l' dezerto.

Faru signon, kaj mi kaptos vin kaj forportos en mian karan patrujon. La maro apartigos nin de la persekutantoj, mirtaj arbetaroj kaŝos niajn karesojn, kaj dioj, pli favoraj por la amantoj gardos nian feliĉon.

Ramzes fermetis la okulojn kaj songis. Tra la mallevitaj okulharoj li ne vidis plu la ĝardenon, sed sole la riveron de la luna lumo, en kiu disfluis nigraj ombroj kaj la kanto de la nekonata homo al la nekonata virino. Dum momentoj la kanto tiel ĉirkaŭis lin, tiel profunde penetris en lian animon, ke Ramzes volis demandi: ĉu ne li mem estas ĉi tiu ama kanto?

En tiu momento lia rango, povo kaj malfacilaj ŝtataj demandoj, ĉio ŝajnis al li mizera bagatelo kompare kun ĉi tiu luna nokto kaj tiuj ĉi ekkrioj de la amanta koro. Se oni proponus al li elekti: la tutan faraonan potencon aŭ lian nunan staton de lia animo, li preferus la revadon, en kiu malaperis la tuta mondo, li mem, eĉ la tempo, kaj restis nur dolĉa sopiro, rapidanta al la eterneco, sur la flugiloj de l' kanto.

Subite la princo vekiĝis, la kanto eksilentis, en la palaco estingiĝis la

lumoj, kaj ĝiajn blankajn murojn forte kontrastis la nigraj, malplenaj fenestroj. Oni povis pensi, ke tie neniue iam loĝis. Eĉ la ĝardeno malpleniĝis kaj eksilentis, eĉ la malpeza venteto ĉesis movi la foliojn.

Unu!... Du!... Tri!... El la templo alflugis tri potencaj bronzaĵoj.

"Jes! Mi devas iri tien", pensis la princo, ne sciante bone kien kaj por kio.

Li direktis sin tamen al la templo, kies arĝenta turo superstaris la arbojn, kvazaŭ alvokante lin al si.

Li iris duonebria, plena de strangaj deziroj. Malvaste ŝajnis al li inter la arboj, li deziris suriri la supron de l' turo, libere ekspiri kaj ĉirkaŭpreni per la rigardo pli vastan horizonton. Poste rememorante, ke estas nun la monato Misori, ke jam pasis unu jaro de la manovroj en la dezerto, li eksentis sopiron al ĝi. Kiel volonte li sidiĝus en sian malpezan ĉaron duĉevalan, kaj galopus ien antaŭen, kie ne estus tiel sufoke, kie la arboj ne kovrus la horizonton!

Li jam estis ĉe la piedoj de l' templo, li do suriris la terason. Silente kaj malplene, kvazaŭ en tombo; nur de malproksime murmuretis la akvo de fontano. Sur la dua ŝtuparo li forĵetis sian mantelon kaj glavon, ankoraŭ unu fojon ekrigardis la ĝardenon, kvazaŭ por adiaŭi la lunon, kaj eniris en la templon. Super li leviĝis ankoraŭ tri etaĝoj.

La bronza pordo estis malfermita, ĉe ambaŭ flankoj de la eniro staris flugilaj figuroj de homoj kun bovaj kapoj, sur kies vizaĝoj regis fiera trankvilo.

"Jen la asiriaj reĝoj", pensis la princo, rigardante iliajn barbojn, plektitajn en malgrandajn harligojn.

La interno de la templo estis nigra, kiel la plej nigra nokto; en la mallumon penetris nur blankaj strioj de la luna lumo, eniranta tra mallarĝaj, sed altaj fenestroj.

En la mezo brulis du lampoj, antaŭ la statuo de la diino Astarte. Iam stranga lumigo de supre faris la statuon perfekte videbla. Ramzes rigardis. Tio estis grandega virino kun strutaj flugiloj. Ŝi portis longan veston kun faldoj, sur la kapo pintan ĉapon, en la dekstra mano paron da kolomboj. Ŝia bela vizaĝo kaj mallevitaj okuloj havis esprimon de tia dolĉeco, de tia ĉasteco, ke mirego ekregis la princon: ŝi ja estis patronino de la venĝo kaj plej senhonta malĉasteco.

Fenicio montris al li ankoraŭ unu el siaj misteroj:

"Stranga nacio", pensis li. "Iliaj homglutantaj dioj manĝas neniun, kaj ilian malĉastecon protektas virgaj pastrinoj kaj diinoj kun infana vizaĝo".

Subite li eksentis, ke sur liaj piedoj traglitis io, kvazaŭ granda serpento.

Ramzes posteniĝis kaj haltis en la strio de la luna lumo.

—Senteraro!—, diris li al si. Preskaŭ en la sama momento li ekaŭdis murmureton:

—Ramzes! Ramzes!

Ne eble estis ekkoni la voĉon: ĉu ĝi estis vira aŭ virina, kaj de kie ĝi venas?

—Ramzes! Ramzes!—, eksonis murmureto, kvazaŭ de la planko.

La princo eniris en nelumigitan lokon kaj aŭskultante klinis sin. Subite li eksentis sur sia kapo du delikatajn manojn.

Li saltis por kapti ilin, sed li renkontis nur la aeron. —Ramzes!—, murmuretis oni de supre.

Li levis la kapon kaj eksentis sur la buŝo lotusan floron. Kiam li etendis al ĝi la manojn, iu delikate sin apogis sur liajn ŝultrojn.

—Ramzes!—, kriis oni de la altaro.

La princo sin turnis posten kaj ŝtoniĝis. Kelke da paŝoj de li, en la luma strio staris belega homo, tute simila al li. La samaj okuloj, — vizaĝo, junula barbo, la sama kresko, movoj kaj vestoj.

Unu momenton la princo pensis, ke li staras antaŭ ia grandega spegulo, kian ne posedis eĉ la faraono. Sed tuj li konvinkiĝis, ke lia samulo ne estas bildo, sed vivanta homo.

En ĉi tiu momento li eksentis kison sur la kolo. Li ree sin turnis, sed estis

neniu, kaj dume lia samulo malaperis.

—Kiu estas ĉi tie?... Mi volas scii!—, diris kolere la princo.

—Mi... Kama—, respondis dolĉa voĉo. En la luma strio aperis belega virino: nuda, kun ora zono ĉirkaŭ la koksoj.

Ramzes ekkuris kaj kaptis ŝin je la mano. Ŝi ne forkuris.

—Ĉu vi estas Kama? Ne, vi estas... Jes, vin iam sendis Dagon, sed via nomo estis tiam Kareso.

—Ĉar mi estas ankaŭ Kareso—, respondis ŝi naive.

—Ĉu vi tuŝis min per la manoj?

—Mi.

—Kiel?

—Jen tiel—, respondis ŝi, ĵetante siajn brakojn ĉirkaŭ lian kolon kaj kisante lin.

Ramzes kaptis ŝin per la brakoj, sed ŝi elŝiris sin kun tia forto, kian oni ne povus supozi en tiel delikata estaĵo.

—Do vi estas la pastrino Kama? Al vi kantis hodiaŭ la Greko?—, diris la princo, pasie premante ŝiajn manojn.

—Kiu li estas, ĉi tiu kantisto?

Kama malestime levis la ŝultrojn.

—Li estas ĉe nia templo.

La okuloj de Ramzes brilis, plilarĝiĝis liaj naztruoj, li sentis zumadon en la kapo. La sama virino antaŭ kelke da monatoj faris je li malgrandan impreson, sed hodiaŭ li estis preta fari por ŝi frenezaĵon. Li enviis al la Greko kaj samtempe sentis nepriskribeblan doloron ĉe la penso, ke se ŝi fariĝus lia amatino, ŝi devus morti.

—Kiel bela vi estas!—, diris li. —Kie vi loĝas?... Ah jes, mi scias, en tiu palaceto... Ĉu oni povas viziti vin?... Kompreneble, se vi akceptas vizitojn de kantistoj, vi povas ankaŭ min

akcepti... Ĉu vere vi estas pastrino, gardanta la fajron.

—Jes.

—Kaj viaj leĝoj estas tiel kruelaj, ke ili ne permesas al vi ami? Eh, tio estas nur vanaj minacoj!... Por mi vi faros escepton.

—La tuta Fenicio malbenus min, la dioj sin venĝus.—, respondis ŝi kun rido.

Ramzes ree altiris ŝin al si, ŝi ree elŝiris sin.

—Gardu vin, princo—, diris ŝi kun provokanta rigardo. —Fenicio, estas potenca, kaj ĝiaj dioj...

—Indiferentaj estas por mi viaj dioj kaj Fenicio! Se unu haro falus de via kapo, mi piedpremus Fenicion, kiel venenan serpenton.

—Kama! Kama!—, eksonis voĉo, venanta de la statuo.

Ŝi ektimis.

—Jen vi aŭdas, ili vokas min. Eble ili eĉ aŭdis viajn blasfemojn.

—Ili ne ekaŭdu mian koleron!—, eksplodis la princo.

—La kolero de la dioj estas pli terura.— Ŝi elŝiris sin kaj malaperis en la ombroj de la templo. Ramzes sin ĵetis post ŝi, sed subite li haltis. La tutan templon, inter la altaro kaj li, plenigis grandega fajra flamo, en kiu komencis sin montri monstraj figuroj: grandegaj vespertoj, rampaĵoj kun homaj vizaĝoj, ombroj...

La flamo iris rekte al li tra la tuta larĝo de la konstruaĵo. Konsternita de la terura spektaklo, la princo posteniĝis. Freŝa aero envolvis lin. Li turnis la kapon -- li estis jam ekster la templo, kaj samtempe la bronza pordego kun bruo fermiĝis post li.

Li frotis la okulojn kaj rigardis ĉirkaŭe. La luno de la plej alta punkto

sur la ĉielo malleviĝis jam al la okcidento. Apud kolono Ramzes trovis sian glavon kaj mantelon. Li levis ilin kaj malsupreniris kiel ebria.

Kiam li malfrue revenis en la palacon, Tutmozis, vidante lian palan vizaĝon kaj malklaran rigardon, ekkriis kun timo:

—Pro dioj! kie vi estis, erpatre? La tuta kortego ne povas dormi de maltrankvilo.

—Mi rigardis la urbon. Bela nokto.

—Ĉu vi scias—, diris rapide Tutmozis, kvazaŭ timante, ke iu ne faru tion pli frue. —Sara naskis al vi filon.

—Ĉu vere? Mi volas, ke neniun maltrankviliĝu, kiam mi promenas.

—Sola?

—Se mi ne povus iri sola, kie plaĉas al mi, mi estus la plej malfeliĉa sklavo en ĉi tiu regno—, respondis maldolĉe la vic-reĝo.

Li transdonis la glavon kaj mantelon al Tutmozis kaj iris en sian dormoĉambron, alvokante neniun. Hieraŭ la novaĵo pri la naskiĝo de filo plenigus lin per ĝojo, sed hodiaŭ li akceptis ĝin indifere. Tuta lia animo estis plena de la rememoroj pri la hodiaŭa vespero, plej stranga kiun li iam travivis.

Li vidis ankoraŭ la lumon de la luno, en la oreloj sonis la kanto de la Greko. Kaj ĉi tiu templo de Astarte!

Li ne povis ekdormi ĝis la mateno.



Kaĵeroj el la Sudo

Bulteno de Hispana Asocio de
Laboristoj Esperantistajstaj



<http://www.gazetoteko.com/hale/kels85.pdf>

Enhavo

Redaktore.....	2
Parolas la Prezidanto.....	3
Kaj finfine Osama venkis Obaman.....	4
Kurso pri Informadiko: Gimp.	6
Lingvo de demokratio, ĉu?...	7
Mistera obeulino.....	12
La faraono, 31 ^a ĉapitro.....	14

ISSN 1886-1997 aŭ
1886-1938 (se printite)
Depósito legal: Z-2398-88

Prezidas: Johano A. Cabezos.
Redaktas: Jesuo de las Heras.
Korektas: Jozefo Pina.
Retskribu al: kajeroj@gmail.com

Oni povas reprodukti la enhavon,
kondiĉe, ke oni citu la originon.
Pri la enhavo de la artikoloj
respon-decas la aŭtoro, ne la
redakcio.

Ni ne korespondos pri nepetitaj
artikoloj, kvankam ni klopodos
publikigi ĉiun artikolon kies
enhavo ne mistraktu personon.

Nova konto La Caixa: 2100 4617 41 2200115275

Kovril: Ĉu voĉdoni estas de-
vo? Ĉu rajto? Ĉu estas honeste
voĉdoni? Ĉu estas pli honeste
ne voĉdoni? Jen kerna temo
de nia numero aprila antaŭ
niaj aŭtonomaj balotadoj en
Hispanio la venontan monta-
ton.

Tute verkita kaj kompilita per
senpagaj linuxaj rimedoj:
Ubuntu, LibreOffice Writer, Gimp kaj
Scribus.